# LA INFORMILO

Bulteno de la Orient-franca Federacio aliĝinta al Unuiĝo Franca por ESPERANTO



Prezidanto : M. Cuéné, 59, rue des Trois-Châteaux - 68 - COLMAR
Vic-Prezidanto (junularaj aferoj) R. KUBLER, 20,rue du Ruisseau -RODEREN-68-THANN
Sekretario : J.P. COLNOT, 15, rue de Lavaux - 54 - LAXOU
Kasisto : J. CHAPELLIER, 109, Avenue de la Malgrange - 54 - JARVILLE
CCP : 399-75 NANCY



N° 62 — Decembro 1969


GOJOPLENAN KRISTNASKON !

FELIĈAN NOVJARON !

BONAN SANON POR 1970 !

deziras al vi la Komitato de la Orientfranca Federacio
kaj la redakcio de la Informilo.

## LA VORTO DE LA PREZIDANTO

"Esperanto ne estas propono ; ĝi estas fakto". Tiun veraĵon mi legis en "Junaĝa Verkaro" de Edmond Privat. Gi gvidu tiun hodiauan "vorto'n".

Efektive Esperanto ne estas "projekto" por solvi lingvajn malfacilaĵojn.Gi ekzistas, ĝi estis kaj estas parolata de milionoj da homoj.Ciutage miloj da esperante skribitaj leteroj estas dissenditaj, ĉiujare miloj da novaj esperantistoj ekestas. Ni do ne bezonas petegi la homojn ke ili lernu la lingvon por ke ĝi funkciu. Ni nur elmontru ĝian ekzistadon. Ni uzu ĝin kaj, samtempe, diskonigu tiun uzadon al la eskteraj indiferentuloj. Ofte jam mi konstatis la grandan impreson kaùzitan de nura montrado de ĵus ricevita eksterlanda letero. Tuj la demandoj ŝprucas kaj vi facile propagandos. Sed, ni neniam forgesu komprenigi al nia interparolanto ke estas nur pro malegoismo ke ni klarigas tiujn aferojn al li : "ni estas jam sufiĉe multnombraj por plene ĝui la diversajn avantaĝojn de nia lingvo"... k.t.p. Ni fieru pri Esperanto.

Tio-ĉi tute ne estas ironie skribita. Mi spertis ion de longe : inciti homon senti sin malfavorita ŝanĝas lian sintenon kaj trudas lin al plia intereso. Fakte, mi memoras pri pluraj nunaj samideanoj, kiujn mi tiele instigis. Eble, baldaù ankaù vi sukcesos havigi al ni tiajn novajn amikojn.

Sed, antaù ol subskribi, mi volas prezenti al vi kaj al viaj familianoj miajn plejn korajn bondezirojn por la venonta jaro. Al nia Federacio mi deziras multajn novajn membrojn.

M. CUENE.

-=-=-=-=-=-

## Ĉu nia Federacio ankoraù vivas ?

Al ĉi-tiu demando, verŝajne respondos ofendetitaj voĉoj : "Jes, kompreneble ĝi ankoraù vivas ! Ĉu ne funkcias kursoj tie kaj tie-ĉi, kaj kunvenoj, kaj la ankoraù proksima dulanda kongreso, kaj.....".

Tamen, se oni relegas ĉiujn numerojn de "Franca Esperantisto" aperintajn de unu jaro (ili ja ne estas tiom multaj !!), oni konstatas ke en la rubriko "Vivo de la Grupoj" oni neniam mencias grupojn en nia Federacio.

Plie, ĉi-tiu Informilo estis aperonta oktobre. Ĉar tute mankis regionecaj informoj, tiam ne estis eble ĝin aperigi. Iom post iom, pene kaj malrapide, fine alvenis tamen, sufiĉe da informoj..... kaj nun jen la rezulto !

El tiuj du konstatoj ŝprucas la demando : ĉu nia bulteno regiona estas necesa ? Ĉu oni daùre ĝin subtenu kaj eldonu ?

...

Memoru : antaù pluraj jaroj, ni eldonis presitan bultenon. Kiam ni ne plu povis tion fari ni anoncis ĝian malaperon, kaj petis niajn legantojn serĉi en "Franca Esperantisto" la informojn koncerne la vivon de nia Federacio.

Ni sendis kelkajn tekstojn. Nur kelkajn ! : Ili ne aperis aù ili aperis en formo tiel mallongigita, aù en tempo tiel malfrua, ke ili fakte al ni neniel utilis !

Tuja konkludo : ni serĉis la rimedojn por eldoni stencilitan bultenon. Principe, ĝi aperas trifoje jare, ne tro malregule. Ni ne forgesu ke ni ŝuldas ĝin al la sindonemo de Sro CHAPELLIER, kiu sukcesas ĝin multobligi, kaj de Fino JACQUOT, kiu tajpas la stencilojn. Se ambaù ne plu povus, ni estus sen ligilo, ĉar aktuale mi ne konas iun ajn alian eblecon. Sed ĝis nun, ni estu al ili dankemaj.

Tamen estus necese, ke io aperu en nia nacia organo pri nia regiona vivo. Ne por nia uzo, sed por ke en cetera Francujo, kaj ankaù eksterlande, kie oni legas "F.E.", oni sciu ke Esperanto vivas en Orienta Francujo.

Do jen propono al ĉiuj respondeculoj de Kulturaj Centroj aù eĉ izolitaj aktivuloj :

Bonvolu sendi al mi (ni diru : trifoje jare) informojn sufiĉe detalajn pri via aktiveco por aperigo en la Informilo. Ŝajnas bone ke ni daùre eldonu bultenon meze de decembro, alian 1 1/2 monaton antaù la Federacia Kongreso (kiu okazos en 1970 kelkajn semajnojn antaù Pentekosto), kaj trian fine de junio. Se necese, kaj se sufiĉaj informoj, ni eldonos kvaran en Oktobro.

Sed samtempe, al la redakcio de "Franca Esperantisto", bonvolu sendi resumon (nur tute etan resumon !) (kun la necesaj postuloj : esti tajpita, kun duobla marĝeno kaj duobla interlinio....)

J.P. COLNOT.

=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=

LA ESPERANTO-VIVO EN .....

STRASBURGO

De du jaroj, kutimo en nia rondo estas, post la someraj libertempoj, kunveni unuafoje meze de septembro. Je tiu okazo, niaj germanaj najbaroj kaj ni rendevuas en nia "boatejo" kie ni gustumas interalie bonajn rostitajn kolbasetojn. Tiun jaron ni estis proksimume dudek.

Repage, la 21an de Oktobro nin invitis en Oberkirch la tiea germana rondo ; tradicie ni gustumas bulban kukon kaj novan vinon. Frata amikeco kaj bonhumoro regas tiujn kunvenojn.

De meze de oktobro Sinjoro Zipfel gvidas kurson por komencantoj en publika lernejo. Lastjare trideko enskribiĝis ; sed nur triono tiun jaron, tute senkaùzo. Al tiuj novbakotaj lernantoj miksiĝis kelkaj el la pasintaj jaroj, kiuj deziras perfektigi sian konon de la lingvo. Ni gratulas ilin.

Por ke niaj novlernantoj sentu sin apogitaj de samideanoj, kaj por ke ili ne forlasu la kurson antaù ĝia fino, ĉiu el ili havas kiel propran peranton membron el nia strasburga rondo. Proksima raporto recenzos pri tiu nova eksperimento.

Dum la lastaj kunvenoj de la jaro, samideaninoj montris siajn fotojn kaj filmojn la 26an de Novembro kaj precipe la 10an de Decembro, en kiu partoprenis la novaj lernantoj, ĉar estis memoro pri la Majstro kaj tago de la libro ; ni montris al ili per filmoj etoson de U-Kongresoj.

En la jaro 1970 ni kunvenos ĉiujn mardojn (anst.merkredoj). La unua renkontiĝo okazos la 6an de Januaro en Palais dela Bière. La lasta antaù la libertempoj la 7an de Julio.

Kompreneble en niaj tri ĉefaj rendevuoj ni invitas vin ; nome :

- en la Hingrie la 23/24an de Majo,
- en nia unua kampofajro la 3an mardon de majo,
- en nia dua kampofajro la 3an mardon de Septembro, per kiu rekomenciĝos niaj aùtunaj kunvenoj.

Sed de nun ni diras al vi : ĝis Epinal en printempo !

F. KNECHT.

=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=

ESPERANTO - LIBROSERVO ( Vidu adreson ĉe paĝo 8a)
Ni rekomendas : MI Amis Junulinon...(J'ai aimé une fille)
Intima korespondado aùtentika, en 55 am-leteroj, publicita de W.TROBISCH. Temas prila dramecaj kaj aktualaj travivaĵoj de afrikaj gejunuloj.
Tradukoj de tiu sensacia libro aperis en pli ol 50 lingvoj. Esperanto-traduko en simpla stilo, de A.BURKHARDT.- Prezo (afrankite) : 8,80 fr.fr.

COLMAR

Okaze de la tiujara federacia kongreso en Colmar la urbestro de tiu urbo promesis al ni subtenon (moralan, memkompreneble) por nia agado ĉi-tie. Tiu promeso ne estis vana, kaj kun granda afableco la direktoro de la junular-kaj kulturdomo ricevis nin kaj metis je nia dispono sian domon por organizi kurson. Malfeliĉe li forgesis averti nin ke tiu ĝentileco estas pagota. Ni komencis do la kurson kun 11 gelernantoj. Post la dua semajno la direktoro petis al ni 11 frankojn por partoprenanto. Ĉar ni ne atendis tiun peton, ni decidis serĉi alian lokon por daŭrigi la kurson.

Dank'al unu el la lernantoj, sinjoro KOPP, kiu gvidis, profesie, la konstruadon de granda teknika liceo en Colmar, la direktoro de tiu liceo, Sinjoro MATTER, permesas al ni fari la kurson en sia lernejo. Ni volas esprimi nian dankon al ambaŭ.

Do la kurso okazas nun regule ĉiun mardon je la 19a en lernoĉambro 107. Ĉeestis la kvinan lecionon 9 personoj.

M. Cuéné

NANCY

Nova provo por starigi parolan kurson tute malsukcesis. Neniu interesiĝis malgraŭ sufiĉe intenca propagando : pluraj gazetkomunikoj, afiŝado en la Junuldomo kaj disdono de turismaj prospektoj kun informoj pri Esperanto, kiu ŝajnis bone sukcesi jam de 6 monatoj (per memservado, la junularo kaptis pli ol 200 tiaj informiloj, sed sendube nur la bildoj interesis ilin).

Dume, la koresponda kurso kontentige funkcias. Ni dissendis dum la pasinta lernjaro ĉirkaŭ 50 gazetartikolojn, alvenis 63 informpetoj kaj ni varbis 23 lernantojn. Kvar el ili jam finis la kurson : Fino Monique Cavadini en Laxou, gvidita de Sro Colnot, Sro Alain Lévy en Bischheim gvidita de Sro Viry - Sino Stengel en Tomblaine,gvidita de Fino JAcquot - Sro Nunige en Mulhausen,gvidita de Sro Bergerot -Pluraj aliaj lernantoj nun atingas la kursfinon, i.a. lernantoj de Sro Zipfel. Du lernintoj aliĝis al nia supra kurso por prepari sin al kursgvidado. Fino Cavadini jam preskaŭ fingvidis novan lernantinon.

Por la nuna lernjaro, ni kalkulas kun la kunlaborado de Sroj Viry(54-Malzéville) DENIS (55-Bar-le-Duc), OFFROY (57-CHATEAU-SALINS), Fino JACQUOT (88-EPINAL), Sro BERGEROT (88-EPINAL), Sro GROSSMANN (25-BETHONCOURT), Sro ZIPFEL (67-STRASBOURG), Sino STENGEL (54-TOMBLAINE). (Ĉiuj indikitaj laŭ ordo de malnoveco en la kunlaborado).

Ni atendas krome respondojn el Sroj KUBLER, MANCEAU, Finoj COLIN kaj CAVADINI. Ni jam dissendis 22 gazetartikolojn, ricevis pli ol 50 informpetojn kaj enskribis ĝis fino de novembro 12 novajn lernantojn.

Dankon ankaŭ al "Ligue Française pro UNESCO" kiu kunlaboras kun nia kurso.

J.P. COLNOT.

°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°

Laŭ leteroj ricevitaj .....

BAR-LE-DUC (Oktobro) Esperanto revekiĝas !

Laŭ strikta obeemo al la centra sidejo kaj al mia konscienco, mi alvokis loke por unua kunveno ; ĝi okazis efektive la 7an deoktobro. Ni prenis la decidon kunveni regule ĉiumonate ; ni projekciis diapozitivojn pri Japanujo, akompanatajn de esperantlingva sonbendo. Je la programo de la venonta renkontiĝo, ni pilgrimos tra Ĉeĥoslovakio dank'al belegaj kolorbildoj kun sonbendo...

En C.E.G. André Theuriet, kelkaj gelernintoj de mia lastjara kurso deziras ĉijare, ke la antaŭvidita klubo ne estu projekto, tial ni kunvenas ĉiuvendredo je la 5a vespera ; deko da interesemuloj ĉeestas (multaj aliaj eniris la liceon kaj mi ne plu havas kontaktojn kun ili), kaj ni tuj planos programon de aktivecoj, sed ege malhelpas min la manko de taŭga ĉambro....

P. DENIS.

-:-:-:-:-:-:-:-

THANN

Pri Thann, estas nenio direnda, mi preskaŭ ne plu estas Thann-ano (1) kaj do ne povas okupiĝi pri la grupo. Nenia kurso funkcias en Thann...

A. GROSSMANN.

(1) Sro GROSSMANN nun laboras ĉe PEUGEOT en SOCHAUX kaj oni trovos pli poste lian novan adreson, kiel kasisto de JEFO (NDLR).

Karaj Amikoj !

El nia ĉarma valo, kiu jam sin pretigas al frosto kaj neĝo, ni salutas vin. Kio okazis, de post la kongreso de tiu ĉi printempo, en nia Esperanto Centro ?

Kiel vi scias, ni ne povis efektivigi la planitan renkontiĝon en Guebwiller, tutsimple pro troa laboro de s-ro Wermelinger.

Post la ferioj, la grupo denove lanĉis sian propagand-kampanjon por la publika kurso. Kiel ordinare, ni disdonis varb-foliojn - kvar mil - kaj afiŝetojn en ĉiujn magazenojn. La rezulto ĉi-jare estis tiom magra, ke ni devis rezigni malfermi novan kurson por komencantoj. Tiu situacio estis ege grava, kaj malesperiga ! Tiam ni streĉis niajn pensojn kaj fortojn, por plej rapide elpensi ion novan. Kaj ni ekfunkciigis novan kampanjon apud la gepatroj de la lernantoj. Tiu kampanjo celis rikolti subskribojn de gepatroj, kiuj apogas la ideon de la enkonduko de Esperanto en la lernejoj. Tiu kampanjo parte sukcesis, ĉar ni ricevis returne plurajn dekojn da respondoj. Oni devas aldoni, ke estis dank'al la kunlaboremo de kelkaj instruistoj (-inoj).

Kuraĝigitaj de tiu nova lumero, ni penis ĉi-foje provi enkonduki reale Esperanton en la lernejojn ! Post kelksemajna atendo, ni, je nia propra miro, ricevis de la inspektoro la <u>oficialan rajton</u> organizi kursojn en la elementaj lernejoj. La Inspektoro, ankaŭ ricevis de supre la permeson tion realigi.

Ni do staris antaŭ nova situacio. Unu problemo, kiu plej ĉagrenis samideanon Wermelinger, estis la manko de adekvata lernolibro. Tuj li entreprenis ekverki ĝin, sin inspirante el la novaj lingvistaj kaj pedagogaj metodoj de Pettyn, Behrmann, Sygnarski kaj aliaj. La metodo ampleksas nun 80 grandformajn foliojn, kaj estis efektivigebla dank'al donaco de papero fare de industriisto de Guebwiller, kaj dank'al la multobligada laboro farita en la urbodomoj de Buhl kaj Guebwiller. La stencilado, bindado, estis faritaj de la familio Wermelinger.

Do, hodiaŭ la situacio estas la sekvanta :

- funkcias nun tri <u>kursoj en elementaj lernejoj</u>, kun ses ĝis dek kvar lernantoj. En Buhl, fraŭlino Stutzmann, eks-direktorino, gvidas kurson por 13 gelernantoj. En Lautenbach, sinjoro Dippert, lernejestro, gvidas kurson por 12 gelernantoj. En Guebwiller, fraŭlino <u>Nadine Dornert</u>, 17 jara liceanino, gvidas kurson por seso da gelernantoj. Ni deziras altiri vian <u>atenton</u> je la kuraĝo de f-ino Nadine. Despli, ke, kiel vi scias, sin proklami "esperantisto" ne estas ĉiam ripoza afero, speciale kiam oni ankoraŭ estas en liceo, kie profesoroj, direktorino, kaj lernantoj vin priridas ! Mi do petas vin : <u>sendu</u> al Nadine viajn gratulojn kaj viajn kuraĝigojn. Ŝi meritas <u>ilin</u> ! Jen ŝia adreso : N.D. 14, rue de l'Eglise Guebwiller 68.

En kvara lernejo, ni nun entreprenas klopodojn, por ke eble s-ino Fischer ankaŭ povu ekkomenci kurson.

------

Alia tre grava fakto : ĉar samideano Dippert estas samtempe la ĉefa responsulo de la grupo de instruistoj de "L'Ecole Moderne" li realigis la aperon de Esperanto-kurso en sia bulteno "Chantiers pédagogiques de l'Est", kiu tuŝas 600 geinstruistojn !

Do, fine, ĉi-jaro prezentas sin esper-plena ! Korajn pensojn !

+++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

<u>ESPERANTO - LIBROSERVO</u>

<u>LEXIQUE FONDAMENTAL ESPERANTO-FRANÇAIS</u> de R.LEGER. La praktika poŝvortaro por franclingvuloj .... Prezo (afrankito) : 5,70 fr.fr.

<u>ESPERANTO</u> = <u>LA LINGVO INTERNACIA</u> <u>facila</u> <u>por vi</u>. La internacia, rekt-metoda amuze ilustrita, 120-paĝa, mult-sukcesa Esperanto-lernolibro uzata en la tuta mondo, de C.WALTER. Klariga teksto en 12 lingvoj. Bela prezentado Prezo (afrankito): 6,30 fr.fr.

MULHOUSE

Nova Esperanto-kurso gvidata de Sino Hervé komencigîs en la Popoluniversitato la ĵaŭdon 9an de Oktobro.

BUHL-GUEBWILLER

Naskiĝis Mikaelo, la 8an de majo, en la hejmo de gesinjoroj WERMELINGER. Gratulojn al la feliĉaj gepatroj kaj bondezirojn al la nova denaska esperantisto (pri kiu fieras Francisko...).

Sukcesa ekspozicio de infandesegnaĵoj en la Junuldomo de Guebwiller

Sekvo al sendo al Siberio de 150 infandesegnaĵoj (vidu la Informilon n° 60an), kiujn desegnis infanoj el 5 vilaĝoj kaj urbetoj en Florivalo, interŝanĝe alvenis 172 desegnoj el la siberia urbo BARNAOUL. Ili konsistigas interesan ekspozicion, kiun oni prezentis en Guebwiller la 10-11ajn de majo. Sro Wermelinger esperas organizi poste tiajn interŝanĝojn kun aliaj landoj.

J.P. COLNOT

NDLR - ni pardonpetas pro la malfrueco de tiuj du lastaj informoj : ili jam estis pretaj por la antaŭa Informilo kaj ne povis trovi lokon en la paĝoj. Ni tamen tre deziris konigi ilin al vi.

" " " " " " " " " " " " " " " " " " " "

FERIOJ EN ESPERANTUJO

Internacia Esperantista Ferio

Mia esperantista vojaĝemeco vojaĝigis min dum tiu-ĉi jaro al kvar landoj : Finnlando, Svedio, Ĉeĥoslovakio kaj Pollando. Mi deziras nun rakonti pri miaj ferioj en Pollando.

Invitite de mia pola korespondantino, mi vojaĝis dum septembro al Pollando. Tie mi partoprenis la 5-an Internacian Esperantistan Ferion, kiu okazis de la 16-a ĝis la 29-a de Septembro, en pitoreska montara ripozloko Miedzygorze (prononcu miendziguĵe). La ferio estis organizita de la feria fako de polaj sindikatoj kaj de la Vroclava Regiono de Pola Esperanto-Asocio. Miedzygorze esta vilaĝo, kiu troviĝas 130 km sude de Vroclavo, en proksimeco de la ĉeĥa landlimo. Tre agrabla kaj kvieta estas tiu loko, kiu ebligas promenadojn kaj ekskursojn en la montaro al vidindaĵoj.

La ferion partoprenis pli ol 300 Esperantistoj el dek tri landoj. Multaj venis el Pollando kaj el najbaraj landoj. El Francio mi estis la sola. Kvankam partoprenantoj estis divers-aĝaj, tamen pli malfacile estis kunvenigi la veteranojn ol la gejunulojn.

La programo de la ferio estis sufiĉe libera, sed per-aŭtobusaj ekskursoj estis organizitaj al diversaj vizitindaj lokoj en la ĉirkaŭaĵo. Tre interesa estis ekskurso al monto Gory Stolowe, kie rokaĵoj havis formojn de bestoj kaj prezentis ĉielon kaj inferon

Vespere okazis diversaj distraĵoj kaj dancamuzoj. Dum la balo de la ĉifonuloj, ĉiu laŭ siaj propraj fantazio, bontrovo kaj ebleco, sin alivestis. Tiel interalie ĉeestis ankaŭ Ramses la 12-a. Dancoj kaj rondoj formiĝis, pare ni paradis, kaj plej bonaj alivestitaj paroj estis premiitaj. Vere ni tre bone amuziĝis, sed kun sekaj gorĝoj, ĉar mankis trinkaĵoj. Eble organizantoj ne pensis, ke tio estas maniero malplenigi monujojn kaj akiri al si monon.

Dum aliaj vesperoj estis preskaŭ ĉiam ebleco danci ĝis noktomeze en apuda kafejo, kie funkciis eta orkestro, tie ankaŭ fluis bulgara vino Riesling. Kompreneble plej fama pola trinkaĵo estis vodko, pri kiu poloj fieris ĝin fortrinki sen halto.

Funkciis dum la tuta ferio radio amatora stacio kun speciala voksigno. Ĝi vokis ĉiutage en la internacia lingvo. Eĉ pola radio kaj televido venis iun tagon por intervjuo okaze de eteraj (ne leteraj) kontaktoj en Esperanto. Mi-mem loĝis en la ĉambro kie estis instalita tiu radio-stacio.

La ferion ankaŭ partoprenis du voĉ-muzikaj ensembloj :

- "Muzilo" ensemblo organizita de la Vroclava Esperanto-Klubo, kiu popularigas Esperanton inter la junulara pere de modernaj distraj kanzonoj.
- "Muzilano" alia konkurenca ensemblo el urbo Krakovo.

Okaze de solenaĵo lige kun la antaŭnelonge pasinta 25-a datreveno de liberiĝo de Pollando, salutis diversaj landaj reprezentantoj. Poste sekvis prezentado de ensemblo "Muzilo". Vespere okazis konkurso inter la ensembloj. Ambaŭ prezentis naŭ kanzonojn en pola lingvo kaj en Esperanto. Tre modernaj estis la melodioj, sed mi iom bedaŭris, ke en ilia repertuaro ne ĉiuj kanzonoj estis en Esperanto. Inter ili oni povis aŭdi : "Vi estas mia damo", "Nun al mi diru plu", "Vento", "Aŭtuna pluvo", kaj aliaj. Ambaŭ ensembloj estis tre meritoplenaj, tamen ensemblo "Muzilano" prezentis kanzonojn kun pli viglaj kaj entuziasmigaj melodioj, sed bedaŭrinde kun tro forta sonorigado.

Per aplaùdoj de la ĉeestantoj, kaj per speciala juĝkomisiono, konsistanta po unu partoprenanto el ĉiu lando, estis decidite aljuĝi premion al la ensemblo "Muzilano" el Krakovo, kiu tiel venkis.

Se vi interesiĝas pri muziknotoj kun esperantlingvaj tekstoj de modernaj polaj kanzonoj en Esperanto, bonvolu skribi al : Centro por eksterlanda Komerco, str.Krakowskie Przedmiescie 7, Pollando.

La 27-an de septembro estis organizitade la Esperanto-klubo en Bystrzyca-Kodzka Internacia vespero de Amikeco kun prezentado de folkloraj dancoj. Poste okazis bankedo kun balo ĝis frua mateno.

Fakte, tiel finiĝis por mi la ferioj en Pollando, ĉar tuj post la balo mi forvojaĝis al Ĉeĥoslovakio, kie post rapida vizito de mia korespondanto, mi plu vojaĝis al Francio.

Dum la tuta aranĝo la loka poŝtoficejo stampis ĉiujn korespondaĵojn per porokaza stampilo. Mi miris ke malmultaj francoj partoprenis tiun aranĝon. Eble ĝi ne estas sufiĉe konigita en nia lando, sed mi povas nur rekomendi ĝin al vi.Ĝia partoprenkotizo estas tre malalta : 160 frankoj por du semajnoj. Ne timu en Pollando vi ne estas malriĉa.

Se vi deziras informiĝi por venontjara aranĝo, bonvolu skribi al : Pola Esperanto-Asocio, Okcidenta regiono, Wroclaw-17, str.Dubois 3.p.k. 16, Pollando.

Kaj agrablajn feriojn en Esperantujo !

André Grossmann

---

Kvara Seminario por Gvidantoj, apud Bruselo : 24-30 aùgusto 1969.

Dum la somero oni kompreneble libertempas, sed oni povas ankaù iom labori. La kvara Seminario por Gvidantoj de Junularaj Organizaĵoj okazis en Vilvoorde, je 10 km norde de Bruselo. Ĝi estis organizita de la NEJO - Komisiono de TEJO kaj de la fondaĵo De Raet, el Bruselo, kaj celis komunan traktadon pri tre diversaj problemoj. 26 gejunuloj el 8 landoj kunvenis en belega hortikultura altlernejo.

Du lingvojn ni ĉefe uzis dum la Seminario : la nederlandan kaj la esperantan. Ni ja havis kelkajn malagrablaĵojn kun la aùdiloj, sed ni ĉiuj admiris la rapidan kaj taùgan interpretadon de Wouter Pilger, kiu havis la malfacilan taskon ĉion traduki sammomente. Okazis ankaù, ke ni uzis la francan, kiam prelegis francparolanta ĵurnalisto en Bruselo.

Ĝenerale ni evitis longajn prelegojn. Kutime enkonduko estis farata de docento, kaj tuj sekvis larĝa diskutado, eventuale ekzercoj. Krom Hans Bakker, kiu ĉefe informis nin pri administrado, ni aùdis interesajn prelegojn pri : asocio kaj ĝia celo, kunsidado kaj diskutado, tekniko de programado, gvidataj de S-ro Kinnekint, kunlaboranto de la Stichting Lod. de Raet ; G.C. Fighiera parolis pri siaj propraj spertoj en la esperantista movado kaj pri la taskoj de centra estraro kaj loka organiza komitato. La funkciadon de la Informservo de la Eùropaj Komunumoj kaj la eùropan kunlaboron koncerne junularaj organizaĵojn ni eksciis de S-ro Van den Broek.

Ni estus devintaj viziti Bruselon, sed denove seriozaĵoj alvokis nin ; ĉiuj kunvenis en salono de la Belarta Palaco por renkonti ĵurnaliston, kiu parolis pri redaktado kaj fotoreproduktado ; kaj poste vizitis nin estro de la Belga Muzikista Junularo. Nur la vespero restis libera !

Certe la programo ŝajnas iom peza,precipe por ni; kiuj devis senĉese ĉion pritakti dum 6 tagoj ! Ankaù tre teda estis la uzo de aùdaparato, kiu preskaù frenezigis nin (miaj oreloj ankoraù zumadas...) Tamen, se la rezulto ne plenumis nian atendon, tiu Seminario efikis je la senco, ke ĝi malkovris al ni multajn neantaùviditajn problemojn ; eĉ la plej bone informitaj inter ni estis vere superŝutitaj de ili sen sukcesi ilin regi !

Ja, la rezulto de nia laborego iom seniluziis la partoprenintojn ; sed mi devus ankaù aldoni, ke ni tamen travivis tre amikajn momentojn inter la esperantistoj kaj la neesperantistoj de nia laborrondo. Je la fino, kiam venis la momento de disiĝo, ĉiuj sentis, ke la rezulto de nia komuna streĉado ne estas... preskaù nulo, kiel kelkaj antaùe timis ! Nun ni estas plibone preparitaj kaj sekvonta Seminario devus plene sukcesi.

Ariane DURAND - EPINAL.

Raporto pri la Itala Kongreso en Como : 13 - 18 septembro 1969

Estus malfacila elekti pli taùgan kaj pli agrablan kongresurbon. Cirkaù 280 personoj kunvenis en Vilao Olmo, vasta nobela restadejo, ĉe la bordo de la lago kaj meze de romantika parko.

...

Junulara aranĝo okazis flanke de la oficiala programo. Proksimume 50 gejunuloj loĝis en la Junulargastejo, kiu agrable situas en la parko mem de Vilao Olmo. Ni havis apartan interkonan vesperon en la vasta loka klubejo "Esperia", apartan junularan balon en la sama loko, kun elekto de "Mr.Esperanto" (post grava dilemo : 2 knaboj akiris saman poent-aron, oni finfine elektis ilin ambaŭ !) Dum la balo, ni subite rimarkis eĉ la ĉeeston de Profesoro LAPENNA!

Teatra kaj koncerta vespero estis aranĝita. Ludis la konataj geaktoroj Srdjan Flego kaj Jana Ravŝelj en "La Leciono" de Ionesco ; sekvis antologio de la Amo en la itala poezio, kaj la vespero finiĝis per orkestro kaj kanto de "La Espero". Okazis ankaŭ interesaj prelegoj, krom la ĝenerala asembleo kaj la fakaj kunsidoj, inter aliaj unu de Prof-ro Tibor Sekelj pri vojaĝo al Laponio. Mi "provis" ĉeesti la kunsidojn de IEJ, sed je mia granda surprizo mi aŭdis preskaŭ nur... italan lingvon !!!

Como oferis al ni sian grandiozan katedralon kaj multnombrajn preĝejojn, siajn luksajn domojn, sian interesan libro-foiron, k.t.p. Ekskurson sur la lago ni faris ankaŭ, vizitis vilaojn kaj ĉiam belegajn ĝardenojn. En Bellagio, kie okazis la bankedo, ni vizitis en Vilao Melzi tutan muzeon, dediĉita al Napoleono ! Sed la lastan tagon la vetero iĝis tre kaprica kaj la tuttaga ekskurso al St-Moritz daŭre aspektis iom "malseka".

Se mi ne estus aŭdinta tiel multe da "krokodiloj", mi dirus tre volonte, ke la itala kongreso agrable sukcesis. Domaĝe !

Ariane DURAND - EPINAL.

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

## K I O  ESTAS  J E F O ?

Al ĉiuj gejunuloj :

Ĉu vi scias kio estas JEFO ? Ĉu vi konas ĝian bultenon "Koncize" ? JEFO (junulara Esperanta Franca Organizo) estas la junulara sekcio de UFE, tio signifas, ke en nia lando estas organizo specife destinata por la gejunuloj sciantaj la internacian lingvon. Ĝia celo estas informi ilin pri la diversaj okazontaĵoj en junularaj Esperantaj medioj, ĉu enlandaj ĉu eksterlandaj. Samtempe ĝi organizas junularajn renkontiĝojn kaj instigas organizadon de tiaj renkontiĝoj.

"Koncize" estas bulteno per kiu JEFO informas siajn membrojn. Ĝi fakte estas komuna informilo por la gejunuloj en Belgio, Germanio, Nederlando kaj Francio. Eble vi jam ricevis ĝin.

Sed kiu estas membro de JEFO ?

Ĉiu junulo malpli ol 25-jara kaj ĉiu studento, pagantajkotizon al UFE(pere de sia federacia kasisto), estas aŭtomate membroj de JEFO, ĉar parto de tiu kotizo estas destinata al ĝi.

Sed tio estas nur teoria, ĉar ofte la estraranoj de JEFO ne estas kontentige informitaj pri via kotizo al UFE, kaj plie tute ne ricevas parton de via kotizo. Tial vi tute ne estas konata de la estraranoj, kaj kompreneble vi ne povas ricevi "Koncize".

JEFO konsciiĝis pri tiu manko, kaj dezirante ordigi la tutan aferon por konten-tige plenumi sian taskon rilate al siaj membroj, ĝi petas vin, pagi vian kotizon por 1970 rekte al ĝia kasisto : S-ro André Grossmann, A.L.T.M. Impasse Flammarion, 25-BETHONCOURT CCP 15 13 72 V Strasbourg.

Li plu sendos la ceteron de la kotizo al la federacia kasisto.

Studentoj estos rilatigitaj kun la studenta sekcio SFELO (Studenta Franca Esperanto-Ligo).

Por la diversaj kotizoj, bonvolu konsulti la apartan kotiztabelon.

La kasisto de JEFO : André GROSSMANN.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

Deziras korespondi : S-ino Jeannette VELTZE, Bielsko-Biala, voj.Katowice, Poŝtkesto 68 Pollando, serĉas korespondanton en Francio.

S-ro Nikola Goliĉ - TROJSTVO HRVATSKA (Jugoslavio) 33-jara oficisto, tre ŝatas Francion, kaj serĉas sinceran amikon ; interesiĝas pri turismo, naturo, muziko.

S-ino Kajna KASABOVA, str.Kiril i. Metodisy - ŜUMEN (Bulgario) -F.D. de U.E.A. por turismo kaj instruado - serĉas francan korespondanton.

La respondo de la Ŝtata Sekretariato pri Junularo kaj Sportoj

Sekve al la modifoj adoptitaj en niaj federaciaj statutoj dum la pasinta kongreso en Colmar, mi unue deklaris tiujn ŝanĝojn en la Prefektejo en Nancy, poste komencis diversajn klopodojn ĉe la departementa servo pri Junularo kaj Sportoj de Meurthe-et-Moselle. Sro Cuéné faris similajn klopodojn ĉe la servo en Colmar.

Malgraŭ favora konkludo de la departementa servo en Nancy, ni ricevis la jenan nean respondon de la 7a de Julio.

" Par votre envoi du 17 Juin 1969, vous avez soumis à mon approbation une demande d'agré-
"ment pour la "Fédération Culturelle de l'Est pour l'Esperanto" nº 27 rue dela Républi-
"que - NANCY.
" Je ne puis donner une suite favorable à cette demande, les activités de cet
"organisme ne relevant pas de mes attributions.

Pour le Secrétaire d'Etat
Pour le Directeur de la Jeunesse et des Activités socio-éducatives,
Le Sous-Directeur chargé des Activités et des Loisirs socie-éducatifs,

signé : Lucien de SOMER d'ASSENOY.

La plej surprizita estis verŝajne la departementa inspektoro, kiu antaŭe asertis, ke tre certe ni ricevus la agnoskon. Li komprenis pri kio temas, nur kiam mi citis al li la talentan respondon de Ministro Debré pri nia Komuna Kongreso en Strasbourg!

J. P. COLNOT.

=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=

NIAJ SOMERAJ EKSKURSOJ

Post niaj ne tre sukcesaj printempaj ekskursoj, ni ekskursis la 22an de junio de Ottrott ĝis Sainte-Odile, piede. Ni retroviĝis sesope en Ottrott (3 el Vieux-Thann, 3 el Nancy), kaj ni unue trinkis kafon atendante, ĉu pluvos aŭ sunos, ĉar la vetero estis minaca ! Finfine ni ekiris, kaj la vetero estis sufiĉe favora, eĉ tre bela en la posttagmezo. Ni trapasis belegajn pejzaĝojn en sovaĝa naturo.

Ni decidis tuj ekspluati la ŝajne pli favoran veteron, kaj jam la 29an de junio ni retroviĝis en LA BRESSE. Ni estis 9, el Vieux-Thann, Cornimont kaj Nancy.
La vetero estis unue belega, kaj ni supreniris ĝis Korvolago. Tiam estis jam multe da nuboj. Ni tagmanĝis sur rokego kun tre bela panoramo, ekzakte super la lago !
Ni pilgrimis poste en malpli bela pejzaĝo ĝis nia reveno en LA BRESSE.

Poste, la diversaj ferioj ne plu ebligis rendevuojn kaj malgraŭ la favora aŭtuna vetero, ni bedaŭru ke tro multaj aliaj okupoj ne permesis pliajn belajn tiajn promenadojn.

Sed ni rekomencos dum la venonta printempo, ĉu ne ?

J.P. COLNOT.

=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=

ESPERANTO-LIBRO-SERVO
Administracio : 24, avenue de Riedisheim 68 - MULHOUSE (Francujo)
Poŝtĉekkonto : Ligue Française "Pro Unesco" - PARIS 16.233.37

- MANUEL D'INITIATION, de B.THAILLET. La simpla, efika kaj ŝatata Esperanto-lernolibro por franclingvaj komencantoj, kiuj lernas sen instruanto. Prezo (afrankite): 1,80 fR.fr.
- MANUEL D'ETUDE, de J.COUTEAUX. Kompleta Esperanto-gramatiko en 18 lecionoj. Detalaj klarigtekstoj. Variaj legaĵoj kun leksikoj. Kutimaj demandoj kaj respondoj. . . . . . . . . . . . . . . . Prezo (afrankite) : 4,80 fr.fr.
- MANUEL DE PERFECTIONNEMENT, de J.COUTEAUX. Praktikaj "sintezaj tekstoj" Esperanto-francaj, por perfektiĝo. . . . . . . . . . Prezo (afrankite) : 4,20 fr.fr.
- L'ESPERANTO DANS L'ENSEIGNEMENT, de Dro P. DENOEL. Franclingva broŝuro, ĵus aperinta, kun la plej trafaj argumentoj favore al instruado de la internacia lingvo en ĉiuj lernejoj. . . . . . . . . . . . . Prezo (afrankite) : 2,00 fr.fr.